

Heinrich Heine,
Softe vibras tra l'anim'

tradukita de Kálmán Kalocsay

Softe vibras tra l'anim'
melodi' tenera,
flugu al la malproksim',
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
kaj se tie ĉarme
ridos roz', en mia nom'
ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".

Heinrich Heine,
Printempa saluto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Iras ĉarma sonoret'
Tra de mi animon.
Sonu printemo kantet'
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,
Kie floroj pendas!
Diru al la roz', ke mi
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1908.*

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.

Heinrich Heine,
Milde fluas tra la kor'

tradukita de Valentin Melnikov

Milde fluas tra la kor'
kanto primavera.
Flugu, melodi-sonor',
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',
super domoj flutu.
Se troviĝos tie roz' –
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.